ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 10-12/2015

Oktobro-Decembro 2015

**JARKOLEKTO 112 - N. 1131-1133 - Oktobro/Decembro 2015**
*Finpresita la 31.12.15* — Finito di stampare il 31.12.15

**Sur la kovrilo:** *En Bangio (Centrafrika Respubliko) Papo Francisko malfermis la unuan sanktan Pordon de la Jubileo de la mizerikordo (v. p. 64).*

# ENHAVO

**LA UNUA PAŜTISTA VIZITO DE PAPO FRANCISKO EN AFRIKO**
En Kenjo, Ugando 63
kaj Centrafrika Respubliko 64

**EL LA KONKLUDO DE LA EPISKOPARA SINODO**
La fina dokumento de la Sinodo pri la familio 65

La 8-an de Decembro 2015: **INAŬGURO DE LA JUBILEO DE LA MIZERIKORDO**
Francisko malfermis la sanktan Pordon de la vatikana Baziliko 68

**ELEKTO DE LA IKUE ESTRARO 2016-2020** 69

**PASTRO FRANCISKO DE PAUL VIKTORO:** la unua brazila Beatulo el afrika idaro 70

**KANONIZO DE LOUIS KAJ ZÉLIE MARTIN:** la gepatroj de sankta Tereza el Lisieux 71

**Ekumenaj BIBLIAJ TAGOJ** kun ADORU en RUMANIO 72

**EXPO 2015** en la itala urbo Milano 73

**69-a IKUE-KONGRESO**
**16-a ĝis 23-a de Julio 2016, Nitra, Slovakio**
Ĉiuj informoj pri loĝeblecoj kaj la aliĝilo de "Nia 69-a" 74

**KION FARAS PAĈJO KRISTNASKO DUM LA JARO?** La respondoj de la britaj infanoj 76

**PATRIOTISMO NE SUFIĈAS:** pri la anglikana fratino Edith Louisa Cavell 79

**MOVADE** 80

**Radio Vatikana**, 74

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**
**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v"** * **Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli **- Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA UNUA PAŜTISTA VIZITO DE PAPO FRANCISKO EN AFRIKO

## Papo Francisko en Kenjo

Papo Francisko merkrede la 25-an de Novembro 2015 alvenis en Kenjon, de kie li komencis sian viziton al tri afrikaj landoj.

La Papon en la flughaveno de Najrobi bonvenigis la kenja ŝtatprezidento Uhuru Kenyatta kun pliaj altaj landaj reprezentantoj. Post la alveno, en sia unua alparolo, li instigis la kenjan registaron al batalo kontraŭ la malriĉeco kaj la neegaleco, kiuj portas perforton. Li insistis, ke estas necese honeste strebi por ĝenerala bonfarto. “Mi antaŭ ĉio petas de vi, ke vi montru konkretan intereson pri la bezonoj de la malriĉuloj,“ li diris. “La sperto montras, ke la perforto, la konfliktoj kaj la terorismo estas instigataj per timo, malkonfido kaj malespero kiu naskiĝas el la malriĉeco kaj la frustriĝo”, li aldonis.



En Najrobi la Papo malaprobis la radikalismigon ĉe junaj homoj, kiuj iĝas ekstremistoj farantaj barbarajn atakojn en la Dia nomo. Dum la renkontiĝo kun la reprezentantoj de la diversaj Eklezioj en la apostola nunciejo ĉe la kenja metropolo, li alvokis islamanojn, protestantojn kaj katolikojn, por ke ili tion kontraŭstaru.

“Nia komuna kredo estas, ke Dio, al kiu ni klopodas servi, estas la Dio de la paco! Lia sankta nomo neniam povas esti misuzata por senkulpigi malamon kaj perforton”, proklamis Francisko.

“Mi scias, kiel viva estas en vi la memoro, de la barbaraj atakoj en Westgate Mall *(superbazaro en Najrobi, ndlr)*, en la universitato de Garissa kaj en Mandera”. La Papo memorigis la atakojn fare de la somalia islamisma movado Ŝabáb, kiu mortigis kelkdekojn da homoj.



“Tro ofte junaj homoj iĝas en la nomo de Dio ekstremistoj, por semi konfliktojn kaj timon kaj por neniigi la kernon mem de nia socio”, diris la Papo du semajnojn post la murdaj atencoj en Parizo.

Ĵaŭdon la 26-an de Novembro, antaŭtagmeze, la Papo solenis la sanktan Meson en universitata rezidejo de Najrobi.

## En Ugando Papo Francisko omaĝis al la martiroj

Sabaton la 28-an de Novembro Papo Francisko atingis Ugandon. Tie li omaĝis al la memoro de la kristanaj martiroj, kiuj en la 19-a jc. en tiu afrika lando preferis sin lasi brulmortigi, ol rezigni sian kredon. Tion li faris dum la sankta Meso okazinta en la preĝejo de Namugong, kiu estas la ĉefa pilgrimloko de la katolikoj ne nur de Ugando, sed ankaŭ de la ĉirkaŭaj landoj. La sanktan Meson partoprenis 100 mil kredantoj.

Ĝuste en Namugong ne malproksime de



*Survoje al la mescelebro en Namugong*

la metropolo Kampala, ĉirkaŭ la jaroj 1885-1887, reĝo Mwanga la 2-a ordonis mortbruligi kelkdekojn da katolikoj kaj anglikanoj, kiuj rifuzis malkonfesi sian kredon. Papo Paŭlo la 6-a sanktproklamis la ugandajn martirojn en la jaro 1964.



*Papo Francisko alvenas mescelebri en Namugong*

Papo Francisko dum la Meso alvokis la kredantojn al misiista strebado, kaj al atesto kaj disvastigado de la kredo. "Tiu ĉi atesto de la martiroj ne povas utili nur al ĉeokaza rememorado aŭ esti konservata en muzeo kvazaŭ valora juvelo. Prefere ni ilin honoradu kune kun ĉiuj sanktuloj per alportado de ilia sindonemo al Kristo en niajn hejmojn, al niaj najbaroj, en niajn laborlokojn kaj en la civilan socio, ne konsiderante ĉu ni restas hejme aŭ ĉu ni foriras al la plej malproksima angulo de la mondo", diris la Papo.

En Afriko nuntempe loĝas ĉirkaŭ 180 milionoj da katolikoj kaj ilia nombro ĉiujare kreskas. Laŭ supozo de la usona universitato de Georgetown en la jaro 2040 ilia nombro povus esti 460 milionoj.

### La Papo en Centrafrika Respubliko

Francisko dimanĉe la 29-an de Novembro komencis sian paŝtistan viziton en Centrafrika Respubliko, en kiu ekzistas civitana milito inter la kristana plimulto kaj la islama minoritato. Post sia alveno al ĉefurbo Bangio li alvokis la loĝantaron, ke ili sin liberigu de la reciproka timo. "Mi deziras al vi kaj al ĉiuj centrafrikanoj pacon", diris la Papo en centro por rifuĝintoj en la preĝejo de la sankta Savanto. "Ni ĉiuj estas fratoj, kaj ĉar ni estas fratoj, ni volas pacon," eksplikis la Papo. La sabatan programon la Papo finis per la sankta Meso en la loka katedralo, en kiu pasintjare islamaj armitoj



*Armitaj policanoj gardis la flughavenon de Bangio*

murdis 15 homojn. Tie li malfermis la sanktan Pordon, la unuan de la Jubileo de la Mizerikordo de la universala Eklezio, pli frue ol la oficiala dato de la 8-a de Decembro, komencotago de la jubilea Jaro en la tuta mondo. Per improvizitaj vortoj, antaŭ ol puŝi la simplan, lignan pordon li diris: «Hodiaŭ Bangio fariĝas la spirita ĉefurbo de la mondo. La sankta Jaro de la mizerikordo alvenas pli frue en ĉi tiu tero. Tero, kiu trasuferas de multaj jaroj militon kaj malamon, nekomprenemon, pacomankon. Sed en ĉi tiu suferanta tero estas ankaŭ ĉiuj landoj, kiuj travivas militon. Bangio fariĝas spirita ĉefurbo de la preĝado al la mizerikordo de la Patro. Ni ĉiuj petu pacon, mizerikordon, repaciĝon, pardonon, amon. Por Bangio, por la tuta Centrafrika Respubliko, por la tuta mondo, por la landoj, kiuj suferas militon ni petu la pacon! Kaj ĉiuj kune ni petu amon kaj pacon. Ĉiuj kune: "Doyé Siriri!"» [ĉiuj rediris en la sangoa lingvo: "Doyé Siriri!"].

Lundon la 30-an de Novembro Papo Francisko vizitis la ĉefmoskeon de Bangio. Ĝi situas en urboparto, kiu el sekuriga vidpunkto estas opiniata sufiĉe riska. La Papo en la moskeo diris, ke "la kristanoj kaj la islamanoj estas fratoj" "Unuigitaj, ni diru 'ne' al la perforto farita ennome de Dio".

Antaŭ ol reveni al Romo la Papo ankoraŭ celebris la sanktan Meson en stadiono de Bangio, kun la ĉeesto de kelkdekmiloj da homoj. Lia lasta frazo estis ekumena: "el la koro de Afriko" li adresis saluton al "mia karega frato" Bartolomeo, Patriarko de la ortodoksa Eklezio, en la festotago de ĝia patrono, sankta Andreo. "Bondezirojn de feliĉo, frateco, kaj mi petas al la Sinjoro, ke Li benu niajn fratinajn Ekleziojn".

# EL LA KONKLUDO DE LA EPISKOPARA SINODO

Sabaton la 24-an de Oktobro, 270 episkopoj aprobis la finan dokumenton de la okazinta Sinodo pri la Familio. Ĉiuj 95 paragrafoj estis akceptitaj de dutriona plimulto. Jen elekto de la plej grava el tio.



*Papo Francisko piediranta al la sinoda kunsido*

"*Ni deziras, ke la fruktoj de tiu ĉi laboro, nun transdonita en la manojn de la Posteulo de Petro, alportu esperon al ĉiuj familioj en la mondo, proponu orientiĝon al paŝtistoj kaj al animzorgantoj kaj donu instigon al evangeliza agado. Konklude de tiu ĉi raporto humile ni petas la Sanktan Patron, ke li pripensu la taŭgecon eldoni dokumenton pri la familio, por ke en ĝi – hejma eklezio – konstante pli kaj pli brilu Kristo, lumo de la mondo".* Per tiuj ĉi vortoj kaj per la preĝo al la sankta Familio finiĝas la konkluda dokumento de la episkopara sinodo. La teksto, kiu estis transdonita al la Papo kiel konsulta voĉo, resumas en 94 punktoj la rezultojn de la sinoda laboro, kiu koncernis, interalie, la maljunecon, la formadon de senta vivo, la Dian planon pri la familio, la malfacilajn familiajn situaciojn, la rilaton inter la Eklezio kaj la familio aŭ la familia spiriteco.

Kiel diris la vatikana proparolanto, pastro Federico Lombardi, la teksto *"estas eksterordinare riĉa kaj multe enhava kaj ankaŭ bone harmoniigita kaj strukturita"*. Laŭ Papo Francisko ĝi ne donas kompletajn respondojn al ĉiuj situacioj, sed ĝi starigas la familion eĉ kun ĝiaj problemoj en la lumon de la Evangelio. La dokumento kopias la tri sekciojn de la t.n. *preparteksto por sinodo:* aŭskultado pri la nuntempa situacio de la familioj, rigardo al la Dia projekto pri la familio kaj la klopodo respondi al la aktualaj defioj. Tamen, kompare kun la origina *Instrumentum laboris,* ĝi montras gravajn ŝanĝojn.

**Familio kaj animzorga akompanado**

La teksto plene konfirmas la eklezian instruon pri la nedisigebleco de la geedziĝo. Sed en Kristo kuniĝas vero kun mizerikordo. De tio leviĝas la alvoko akceptadi ĉiujn, kiuj estas vunditaj.

Tial, kerno de la dokumento estas la t.n. *"scipovo akompanadi"*. La Eklezio sentas la urĝan bezonon helpi la baptitojn trovi la Dian gracon, kiu efikas en iliaj vivoj – kaj tio eĉ en malfacilaj situacioj – por ilin alkonduki al la pleneco de la sakramenta geedziĝo. *"La Sinodo estimas kaj instigas la familiojn, kiuj respektas la belecon de la kristana geedziĝo. Samtempe ĝi volas subtenadi la animpaŝtistan distingon de la situacioj, en kiuj la akcepto de tiu ĉi donaco estas nur apenaŭ ĝuste aprezata aŭ estas diversmaniere difektata. Gravas konservi kun tiuj homoj animzorgan dialogon, por ebligi al ili veran malfermiĝon al la Evangelio de la geedziĝo kaj de la familio laŭ ĝia pleneco",* skribis la sinodaj patroj.



Laŭ la dokumento estas celtaŭge klare prezenti la mesaĝon de la Evangelio kaj samtempe ekkapti elementojn en tiuj situacioj, kiuj ankoraŭ ne plene korespondas al ĝi. Tio ekzemple rilatas la aliron al homoj, kiuj vivas kune sen geedziĝo. Konstrua aliro povas tiujn situaciojn ŝanĝi cele al konvertiĝo al pleneco de geedziĝo. Akompanado necesas ankaŭ ĉe tiuj homoj, kies geedziĝo disfalis, aŭ kiam geedzoj travivas krizon.



## Situacio de homoj divorcintaj, kiuj vivas en nova geedziĝo

Eksedziĝintaj homoj, kiuj denove civile geedziĝis, devas esti pli multe integritaj en la kristanajn komunumojn, por ke ili *"ne nur sciu, ke ili apartenas al la korpo de Kristo, kiu estas la Eklezio, sed ke ili ankaŭ havu en tio ĝojan kaj fruktodonan speron". "Ne nur ili ne devas sin senti ekskomunikitaj, sed oni devas al ili ebligi vivi kaj maturiĝi kiel vivantaj membroj de la Eklezio, kiun ili perceptu kiel patrinon, kiu ilin ĉiam akceptas kun amo, kiu pri ili zorgas kaj kuraĝigas ilin laŭ la Evangelio".*

Kvankam la fina teksto de la episkopara sinodo laŭvorte ne parolas pri la ebleco de eksedziĝintaj regeedziĝintoj, ĝia ŝlosila nocio pri la aliro al homoj en malfacilaj situacioj estas *"distingado"*. Pli profundigas tion la vortoj de s-ta Johano Paŭlo la 2-a, laŭ kiu estas, ekzemple, diferenco inter tiuj, kiuj strebis per ĉiuj fortoj savi la geedzecon, kaj tiuj, kiuj ĝin konscie likvidis. La dokumento tial proponas iujn kriteriojn de distingado.

Eĉ se restas objektivaj principoj daŭre validaj, subjektive estas iam ankaŭ pli malgrandigita respondeco aŭ eĉ nenia respondeco de homo pro estinta situacio. Tial tasko de la pastroj estas akompanadi la interesitojn, laŭ la instruo de la Eklezio kaj la instrukcioj de la Episkopo.

Celo de tiu ĉi akompanado estas helpi al ĉiuj kredantoj, por ke ili konsciu pri sia situacio antaŭ Dio kaj trovu la vojon *"al pli plena partopreno en la vivo de la Eklezio". "Interparolo kun pastro, en interna forumo* (t.e. interna areo de konscienco – ndr)*, helpas por la formado de la ĝusta prijuĝo pri tio, kio malhelpas al pli plena partopreno en la vivo de la Eklezio kaj pri la paŝoj, kiuj al tio povas helpi,"* skribas la sinodaj patroj.

Ĝuste ĉi tiu alineo pri la distingado (n-ro 85) estis aprobita  per du-triona plimulto nur limtuŝe – per 178 voĉoj, dum necesaj estis minimume 177.

## Personoj kun samseksema orientiĝo

Pri la samseksemeco la fina dokumento sin dediĉas precipe el vidpunkto de la familioj, interne de kiuj vivas homo kun samsek-sema orientiĝo. La sinteno de la Eklezio rilate al tiuj homoj devas esti la sinteno de Kristo, kiu en la amo sin donacis por ĉiuj senescepte. La sinodaj patroj diras, ke ĉiu homo, sendepende de sia orientiĝo, devas esti respektata en sia digneco kaj akceptita kun estimo kaj zorgo, kiu *"evitas iun ajn signon de nejusta diskriminacio"*. Al la familioj, en kiuj vivas homoj kun samseksema orientiĝo, devas esti dediĉita aparta zorgo.

Samtempe la teksto ripetas, ke *"ekzistas neniu bazo por asimilado aŭ kreado de analogioj, eĉ ne malproksimaj, inter samseksemaj*

*ligoj kaj la Dia plano pri geedzeco kaj familio“*. Por la sinodo estas neallaseble, ke la lokaj Eklezioj submetiĝu ĉi-teme al ia premo, same kiel estas neakcepteble, ke internaciaj organizaĵoj kondiĉigu la helpon al malriĉaj landoj per la akcepto de tiuj leĝoj.

Kiel diris kardinalo Christoph Schönborn, la fakto, ke la ferma dokumento sin ne dediĉas pli amplekse al tiu ĉi temo, reflektas la diversan sentemon, kiun rilate al tiu temo havas la episkopoj el diversaj kulturoj

**Pliaj temoj**

Sed la episkopoj pritraktis ne nur la menciitajn temojn. En la dokumento oni povas trovi ankaŭ analizon de la samtempa socio en rilato al familioj, demandon pri la malriĉeco aŭ influo de la laboro sur la familia vivo. La teksto ankaŭ sin dediĉas al miksedziĝoj.

Laŭ la sinodaj patroj estas necese plifortigi la preparon al la geedziĝo, antaŭ ĉio por la gejunuloj, kiuj perdas kuraĝon. La partoprenantoj de la renkontiĝo ankaŭ skribas pri la rilato inter familio kaj konsekrita vivo, kaj pri la eduko en la sfero de sekseco kaj korpeco.

La sinodo plie emfazas la sanktecon de la homa vivo ekde la koncipiĝo ĝis la natura morto kaj avertas kontraŭ la danĝeroj, kiuj minacas la familion, nome la abortigo kaj la eŭtanazio.



*Alparolo de la Papo dum la danka sankta Meso*

Esenca parto de la dokumento estas dediĉita al la bezono ŝanĝi la eklezian lingvaĵon, por ke dum la proklamado de la Evangelio ĝi vere korespondu al la profundaj homaj bezonoj.

*Ondřej Mléčka - Fotis Marija Belošević*



*Danka Meso en la Baziliko de Sankta Petro en Vatikano la 25-an de Oktobro 2015*

La 8-an de Decembro Papo Francisko solene inaŭguris la ekstervican Jubileon de la Mizerikordo, malfermante kaj transpasante la sanktan Pordon de la vatikana Baziliko, post la Meso en placo sankta Petro, fronte al 70.000 personoj.

# «Ke la Jubileo de la mizerikordo portu al ĉiuj la bonecon kaj la tenerecon de Dio»



Iom post la loka horo 11-a la Papo metis siajn manojn por puŝi la bronzan sanktan pordegon, kvankam la privilegion de la unua malfermo li jam rezervis al la koro de Afriko, al la ligno de pordo malpli majesta, sed por la Papo de la periferioj, ne malpli sankta: tiu en la Katedralo de Bangio, Centrafrika Respubliko.

La klapoj de la vatikana pordo malfermiĝis kaj la kontraŭluma profilo de Francisko kun malfermataj brakoj eniris en la duonlumon de la Baziliko. Malantaŭ li staris la emerita Papo Benedikto la 16-a, kiu, kiel dua, trapasis la pordon. Malrapide Francisko antaŭeniris al la ĉefaltaro de la Baziliko; post li estis la longa procesio de kardinaloj, episkopoj, pastroj.

Dum sia prediko okaze de la antaŭa Meso la Papo resumis la celon de la Jubileo: «Ĝi estos jaro dum kiu kreski en la konvinko pri la mizerikordo. Kiom da maljustaĵoj oni faras al Dio kaj al lia graco kiam antaŭ ĉio oni diras, ke la pekojn punas lia juĝo, sen antaŭdiri, ke ili estas pardonataj de lia mizerikordo. Jes, estas ĝuste tiel. Ni devas antaŭmeti la mizerikodon antaŭ la juĝo kaj ĉiuokaze la juĝo de Dio estos ĉiam laŭ la lumo de lia mizerikordo. Ke la trapaso de la sankta Pordo, do, sentigu nin partoprenantoj de ĉi tiu mistero de amo, de tenereco».

Mizerikordo, tenereco, pardono. 70.000 fideluloj en placo sankta Petro kaj multegaj aliaj ekster ĝi submetiĝis la 8-an de Decembro, jam ekde la tagiĝo, je la tre striktaj sekurec-rimedoj: plurfojaj kontroloj ĉe la pasejoj, detalegaj traserĉoj, longaj vicoj por trapasi la metal-rivelilojn kaj poste por trapasi la sanktan Pordon; helikopteroj konstante superflugis la placon, iom kovrante per sia bruo la kantojn de la koro de la siksta Kapelo. Ĉion oni pacience eltenis por aŭskulti rekte la mesaĝon de la Papo por la sankta Jaro.

Francisko ĝin komencis per penso al la senmakula Maria, en la tago de la soleno al Ŝi dediĉita, ĉar ĝuste en Ŝi oni vidas, kiel la peko en la paradiza ĝardeno solviĝis per projekto de amo, kiu savas. Alia fadeno igas pli valora la jubilean teksaĵon: ĝi estas la heredaĵo de la dua vatikana Koncilio, kiu ĝuste la 8-an de Decembro de antaŭ 50 jaroj finiĝis donacante al la Eklezio monumentan kredo-riĉaĵon. Do, la Jubileo kiel jaro de graco, estigita de la samaj forto, entuziasmo, misiista elano, kiuj fontis antaŭ duona jarcento el la koroj de la konciliaj patroj.

Post la Meso kaj la malfermo de la sankta Pordo Francisko aperis je tagmezo, kiel kutime, je la fenestro de sia privata kabineto por la trapreĝo de la Anĝeluso. «Ke la festo de la Senmakula fariĝu la festo de ni ĉiuj – li deziris – kiuj kapablas akcepti Dion kaj esti farantoj de mizerikordo. (…) Ni ne timu: ni lasu nin esti ĉirkaŭbrakitaj de la mizerikordo de Dio, kiu atendas nin kaj ĉion pardonas. Nenio estas pli dolĉa ol lia mizerikordo. Ni lasus nin esti karesitaj de Dio: li estas tre bona kaj ĉion pardonas».

Ankoraŭ la 8-an de Decembro, sed posttagmeze, okazis la tradicia omaĝo de la Papo al la statuo de la Dipatrino en la centra roma placo de Hispanio. Je la ĉeesto de miloj da fideluloj li preĝis sub la statuo de la Virgulino, kiu staras sur alta kolono. Francisko memorigis,

ke estas loko por ĉiuj sub la mantelo de la Patrino de Mizerikordo: ŝia koro estas plena je tenereco rilate al ŝiaj gefiloj. «Rigardante vin, Patrino nia senmakula - preĝis la Papo - ni agnoskas la venkon de la dia mizerikordo sur la pekado kaj ĉiuj ĝiaj postsekvoj, kaj revigliĝas en ni la espero je pli bona mondo, libera disde sklaveco, rankoroj kaj timoj». Poste Francisko atingis la Bazilikon de sankta Maria la granda, kun momento de enmemiĝo fronte al la ikono de Maria Savo de la roma popolo.

La intensa tago de la inaŭguro de la Jubileo de la mizerikordo finiĝis en placo sankta Petro per arkitektura projekciado inspirita de la homa digno, la naturo kaj la klimataj ŝanĝiĝoj.

La fasado kaj la kupolo de la vatikana Baziliko fariĝis la ekrano sur kiu oni montris belegajn fotografiojn kaj filmetojn kun koncernaj sonoj: la elburĝono de floroj, la akvoplaŭdo, la bestoj, la popoloj. Poste la grandaj urboj, la barakaroj, la pli malproksimaj vilaĝoj: entute festo de lumoj kaj koloroj, kiuj ege mirigis la ĉeestantojn en la placo.

Temis pri projekciado de verkoj, kun titolo "Fiat Lux" (Estu lumo), de internacie famaj fotistoj kaj filmistoj: ĝi volis esti donaco al Papo Francisko kaj samtempe alvoko por sentivigi la mondon pri la neceso protekti la komunan domon, en la tagoj kiam la mondaj estroj klopodis, kadre de la monda konferenco en Parizo, atingi akordon por limigi la klimatajn ŝanĝiĝojn.



## ELEKTO DE LA IKUE ESTRARO 2016-2020

Venontjare la membroj de IKUE estos vokataj elekti la novan Estraron de la Unuiĝo, laŭ tio, kion preskribas la Statuto. Jen la ĉefaj reguloj:

ARTIKOLO 14 – Estraro — La Unuiĝon administras Estraro konsistanta el la Prezidanto kaj el 5 membroj, elektitaj de la Asembleo surbaze de listo de kandidatoj. Al ili aldoniĝas la religia Konsilanto, laŭ la Kanonjura Kodo n-ro 324§2, kiu estas sacerdoto jam elektita en la Estraro, aŭ, se ne, alia kooptita de la Estraro. La Estraro redaktas la regularon por la prezento de la kandidatiĝoj, kiuj ĉiuokaze devas atingi la Centran Oficejon de IKUE almenaŭ 3 monatojn antaŭ la dato de la elekto. Ĉiuokaze la kandidatoj devas esti membroj de la Unuiĝo ekde tri sinsekvaj jaroj, inkluzive de la jaro, en kiu okazas la elekto, kaj devas havi la kapablon kaj eblecon plene engaĝiĝi por la laboro de la Estraro kaj devas esti minimume 18-jaraĝaj je la dato de la elekto. Por la validigo de kandidatiĝoj decidas la Sekretario de IKUE surbaze de la preskriboj de ĉi tiu artikolo. En kazoj de duboj li interkonsiliĝas kun la Prezidanto. La decidon pri nekandidatebleco kaj la koncernajn motivojn oni devas komuniki al la koncernata persono. La Estraro estas elektita por 4 jaroj kaj ĝiaj membroj estas ĉiam denove rekandidateblaj por nova elekto, krom en la kazoj de forfalo aŭ forigo menciitaj de la artikolo 11 de ĉi tiu Statuto.

ARTIKOLO 16 – Konsilio de la Kontorevizoroj — La Konsilio konsistas el 3 membroj elektitaj de la Asembleo kune kun la Estraro, surbaze de listo de kromaj kandidatoj minimume 18-jaraĝaj, kiuj povas ankaŭ ne esti membroj de la Unuiĝo, kondiĉe ke ĉi-kaze ili estu proponitaj de membro, kaj ke ili parolu Esperanton. Post elekto ĉiuj revizoroj devas ĉiuokaze esti membroj de IKUE por ofici. La deĵoro-tempo de la Konsilio koincidas kun tiu de la Estraro samtempe elektita.

La kompletan tekston de la Statuto oni trovas je la interreta adreso: www.ikue.org/arkivo/statuto.htm aŭ oni povas ricevi ĝian paperan version skribante al la C.O. de IKUE: adreso en la dua kovrilpaĝo de ĉi tiu EK-numero.

Kiu deziras kandidatiĝi, havante la suprajn karakterizojn, tiu povas sendi sian peton al la C.O. de IKUE, indikante sian pretecon kandidatiĝi por la prezidanteco, por la estraro aŭ por la konsilio de la Kontorevizoroj, aldonante, laŭeble, personan fotografion kaj mallongan biografian noton. Nedevige, sed por rapidigi la laboron de la Sekretario de IKUE, oni estas invitataj aldoni indikojn pri siaj transpagoj de la membrokotizoj de la lastaj 3 kalendaraj jaroj. **Limdato por la kandidatiĝoj estas la 16-a de Aprilo 2016.** Dum la 69-a IKUE-kongreso en Nitra okazos la jara Asembleo de la IKUE-membroj.

En la venontaj EK-numeroj aperos ĉiuj indikoj por la balotado. **La ĝenerala Sekretario de IKUE**

## PASTRO FRANCISKO DE PAUL VIKTORO
### la unua brazila Beatulo el afrika idaro

Pastro Viktoro estis paroĥestro de urbo "Três Pontas" dum pli ol kvindek jaroj, ĝis li mortis la 23-an de Septembro 1905.



La Eklezio en la urbo Três Pontas, sude de brazila ŝtato Minas Gerais, festis. La 14-an de Novembro 2015 okazis la beatproklamo de pastro Francisko de Paul Viktoro, filo de sklavoj. La anoncon de la dato de beatproklamo faris la Episkopo de la Diocezo de Campanha, Mons-ro Diamantino Prata de Carvalho, kiam li ricevis la vatikanan agnoskon "nenio kontraŭas". Tiel pastro Viktoro, kiel oni lin nomas, fariĝis la unua brazila beatulo el afrika idaro. Papo Francisko permesis al la Kongregacio por la Aferoj de la Sanktuloj la 5-an de Junio 2015 publikigi la Dekreton pri la miraklo atribuita al la interveno de pastro Viktoro, kies karitato al la proksimuloj popularigis lin.

Francisko de Paul Viktoro naskiĝis la 12-an de Aprilo 1827 en Vila da Campanha da Princesa (MG). Li estis filo de sklavino, Lourença Justiniana de Jesus. Li havis kiel baptopatrinon sian propran mastrinon, Marianna de Santa Bárbara Ferreira. Malgraŭ tio, ke li komencis labori kiel tajloro, la revo de Viktoro estis sacerdotiĝi, revo malpermesita al li tiel, ke oni diris, ke "la kokidoj havos dentojn" se li pastriĝos.

Estis malfacilegaj kaj tragikaj la tempoj de sklavisma reĝimo kaj al la sklavoj estis malpermesite havi ian ajn postenon, ĉu civilan, ĉu eklezian. Al la sklavoj estis malpermesite eĉ studi. La deziro de Viktoro neatendite ricevis alian destinon per la helpo de lia baptopatrino-mastrino kaj la vigla volo de mons-ro Antonio Vicoso, tiama Episkopo de diocezo Mariana kaj plena aboliciisto, kiu tre helpis la junulon.

**Malamikaĵoj en la Seminario**

Studinte la komencajn jarojn danke al maljuna paroĥestro de Campanha, pastro Antonio Felipe de Araújo, Viktoro estis akceptita en la Seminario de Mariana. Tie li elportis pacience ĉiajn malamikaĵojn kaj diskriminaciojn de aliaj seminarianoj tiel, ke li fariĝis servanto de ili. Unu el ili skribis, ke malgraŭ ĉio "Viktoro esperis, ĉiam esperis". Per sia humileco kaj decidemo ĝis la fino Viktoro konkeris la simpation de ĉiuj. Post kiam ĉiuj kanonikaj malpermesoj estis superitaj per indulto, li pastriĝis la 14-an de Junio 1851. Tamen la plejmulto de la blankuloj ne akceptis, ke negra ekssklavo povus esti pastro kaj rifuzis eĉ ricevi la komunion de li. Kiam li estis sendita al urbo Três Pontas la 18-an de Junio 1852 kiel vicparoĥestro, okazis granda tumulto kaj nemalmultaj riproĉoj flanke de la popolo. La humileco kaj pacienco kun la fortega helpo de tuteca amo al Jesuo Kristo, kaŭzis, ke pastro Viktoro ne nur estis akceptita, sed eĉ ankaŭ "adorita" de siaj paroĥanoj. Li estis paroĥestro de Três Pontas dum pli ol kvindek jaroj, tio estas, ĝis sia morto la 23-an de Septembro 1905. Oni entombigis lin en lia paroĥa preĝejo, kie, en 1999 oni komencis procezon por kanonika agnosko kaj liaj mortaj restaĵoj estis translokigitaj al nova sarkofago.

Pastro Viktoro respondecis pri la konstruo de la lernejo de sankta Familio, kie li ankaŭ estis instruisto. La lernejo havis precizan celon: enkonduki en la studojn kaj malriĉulojn kaj riĉulojn, blankulojn kaj nigrulojn, konvinkite, ke la kulturo, alligita al la kredo, povus fondi novan socion, unuecan kaj fratecan. Krome, pastro Viktoro konstruis la preĝejon

Nia Sinjorino de la Helpo, la plej granda de ŝtato Minas Gerais. De li oni memoras la karitaton, kiu karakterizis lin. Li vivis en absoluta malriĉeco. La diablo timis lin kiel ekzorciston tiel, ke ĝi nomis lin “tiu nigrulo malbela de elstaraj lipoj”. La spirita kaj kultura heredaĵo lasita de pastro Viktoro konsistigas la unikecon de urbo Três Pontas kaj de la ĉirkaŭaj teritorioj, kaj granda estas la venerado, kiun la fidelularo donas, tributas al li, kun la espero, ke li estos oficiale agnoskita de la Eklezio kiel la “sanktulo de la neeblaĵoj”.

*La tekstojn de la retpaĝo de Radio Vatikana en la portugala lingvo tradukis Vitor Luiz, Brazilo.*

# KANONIZO DE LOUIS KAJ ZÉLIE MARTIN

Dum la episkopa Sinodo pri la familio la 18-an de Oktobro 2015 matene, en placo sankta Petro, okazis kanonizo. La sankta Patro Francisko enskribis en la liston de la sanktuloj kvar sanktulojn, inter ili la geedzan paron Ludovikon (1823-1894) kaj Zélie Martin (1831-1877), gepatrojn de sankta Tereza el Lisieux.

“La sanktaj geedzoj Ludoviko Martin kaj Maria Zélie Guérin vivis kristanan servon en sia familio kaj tagon post tago ili kreis medion plenan de kredo kaj amo. El tiu ĉi etoso estiĝis la vokiĝoj de iliaj filinoj, inter kiuj estas sankta Tereza de Infano Jesuo”, diris Papo Francisko en sia homilio.

Fama filino de geedzoj Ludoviko kaj Zélie Martin, s-ta Tereza de Infano Jesuo, rigardis siajn gepatrojn “indaj je la ĉielo”. Ambaŭ gepatroj konsciis, ke ilia vojo al sanktiĝo ne direktas ekster geedzeco, sed pere de ĝi. En ĝi, nome, realiĝas la sama amo, kiu ligas la Eklezion kun Kristo. Esprimas tion ankaŭ la kuna beatproklamo de ambaŭ geedzoj, kies reciproka amo atingis heroecan dimension.

Sanktaj Ludoviko kaj Zélie povas esti modelo por la hodiaŭa mondo, precipe kiam temas pri la geedzeca moralo kaj la malfermiteco al la vivo. Tio postulas vojon direktantan kontraŭ la nuntempaj tendencoj kaj stabilecon en la kredo. La kristana perfekteco envicigas ĉiun en la evangelizadan agon de la Eklezio, kiel atestas la vivpriskribo pri geedzoj Martin farita de ilia filino mem – sankta Tereza de Infano Jesuo, spirita misiistino kaj patronino de la misioj.

Estonta karmelanino, patronino de Francio kaj doktorino de la Eklezio, Tereza Martin naskiĝis la 2-an de Januaro 1873. Ŝia patrino, Zélie, estis jam 42-jaraĝa kaj la patro, Louis Martin, estis 50-jarulo. Zélie Martin mortis kvar jarojn poste. Ĝenerale konata fakto estas la signifo, kiun havis la malsano de la patro por la spirita maturiĝo de la “eta Terenjo”, sed malmulte oni parolas pri la rolo de la patrino. La leteroj de Zélie Martin al sia edzo, kiujn Terenjo ofte citas en sia “Taglibro de la animo”, atestas pri la granda patrineca amo por la plej juna filino.



La leteroj estis unuafoje publikigitaj en la jaro 1941. Ili estas atesto pri la profunda ligiteco de la geedzoj, priskribante ne nur iliajn ĝojojn, sed ankaŭ la dolorojn pro la morto de kvar el iliaj infanoj. En siaj lastaj leteroj Zélie Martin priskribas la jarojn de la malsano, pro kiu ŝi fine mortis. Krom tio ili dokumentas etajn eventojn el la vivo de la normandia urbeto Lisieux kaj oni povas ankaŭ legi pri ilia profunde kristana sinteno al proksimuloj, kaj pri la ĉiutaga vivo de familio Martin.

La proceso por la beatproklamo de geedzoj Martin komenciĝis en la jaro 1957. La dekreton pri iliaj n heroecaj kristanaj virtoj promulgis en 1994 Papo Johano Paŭlo la 2-a. De 2003 okazis kelkaj resaniĝoj pro iliaj propetoj, kio ebligis en 2008 ilian beatproklamon.

## Ekumenaj BIBLIAJ TAGOJ kun ADORU en RUMANIO

Estimataj, mi invitas vin partopreni la Bibliajn Tagojn okazontajn de la 6-a ĝis la 10-a de Aprilo 2016, de merkredo (18:00 h.) ĝis dimanĉo (13:00 h.) en la dua semajno post Pasko.

Kie? En la nord-okcidenta rumana urbo Baia Mare. Ĝi havas ĉirkaŭ 120 mil enloĝantojn kaj interesan historion kaj nuntempon, ankaŭ koncerne kristanajn konfesiojn.

Kial? Kvankam iom malproksime por multaj (sed najbare ekz. por hungaroj, slovakoj kaj kompreneble rumanoj!), la urbo kaj lando havas plurajn avantaĝojn por la Bibliaj Tagoj: post la fino de la socialisma diktaturo kaj la aliĝo al la Eŭropa Unio, ankoraŭ nun la lando estas iom nekonata en Okcidento; la nivelo de la prezoj estas ankoraŭ malalta, almenaŭ laŭ okcidenta kutimo; la elektitaj hotelo Roxana Imperial kaj ĝia restoracio estas bonaj kaj altkvalitaj. Krome ili estas proksimaj al la paroĥa domo, en kiu okazos la plimulto el la programeroj de la Bibliaj Tagoj.

Ankaŭ el ekumena vidpunkto, Baia Mare kaj Rumanio estas interesaj: por la unua fojo la Bibliaj Tagoj okazos en lando el ortodoksa plimulto: en Baia Mare estas ankaŭ multaj protestantoj kaj katolikoj (rom- kaj grek-katolikoj).

Oni povas vojaĝi al Baia Mare per aŭto, per eŭropaj liniaj busoj (el Budapeŝto ekzistas rekta konekto) kaj aviadile, ekzemple al la flughaveno Cluj, de kie oni povas facile pluvojaĝi per trajno.

La nepino de Maria Laszlo, kaj bofilino de Teresia Scurt, pretas helpi, profesie tamen senkoste, al ĉiuj, kiuj deziras helpon, proponojn, ideojn pri la vojaĝo, laŭ tio, kio estas por vi plej grava (prezo / komforto / daŭro). Vi povas kontakti ŝin rekte (se ne en la rumana, nur anglalingve) per Facebook: Iulia Dan Scurt. Ne hezitu demandi al ŝi, kiu estas helpema kaj afabla.

Kiom ĝi kostos? La prezoj multe varias laŭ viaj deziroj: se vi volas loĝi sole en hotelĉambro, kun kompletaj restoraciaj manĝoj (matene, tage, vespere), ĉio kostos 170 €. Se vi pretas loĝi plurope en du, tri, aŭ kvinlita ĉambro, la prezo malaltiĝas ĝis 114 €. Se vi volas rezigni pri iuj el la restoraciaj manĝoj (eblos ankaŭ iom da memzorgado, matene kaj vespere, en la paroĥa domo) ankoraŭ la prezo povas malaltiĝi je 40 €, do al minimume 74 €, inkluzivante 4 hotelajn tranoktojn (tamen kvinope), tagmanĝojn kaj la ekskurson al la tradicia ortodoksa monaĥejo de Birsana.

Demandojn pri loĝado, prezoj kaj lokaj kondiĉoj, bonvolu rekte turni al Maria Laszlo (laszlo_maria@yahoo.com).

Tiuj, kiuj jam partoprenis la Bibliajn Tagojn, ŝatas la amikecan etoson kaj tiun miksaĵon el spirita, kleriga, Biblia, muzika, turisma kaj distra programeroj. Se vi jam konas Bibliajn Tagojn, ne hezitu veni al Baia Mare! Se ne, venu por ankaŭ samtempe konatiĝi kun tiu eŭropa urbo (kaj lando), kaj kun la libera, malferma, eklezia kunuleco en Esperantujo!

Ĝis revido en Baia Mare!

Vian partoprenon ĝojatendas ***Stefan Lepping*** stefanlepping@gmx.de

✂– – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – –

**ALIĜILO**

Mi venos al Ekumenaj BIBLIAJ TAGOJ kun ADORU en Baia Mare, Rumanio.

NOMO:
ADRESO:
LANDO:
RETADRESO:
TELEFON-NUMERO: (ankaŭ de poŝtelefono)
KONFESIO:

**MI MENDAS:**

__ tranoktojn en __ - lita ĉambro, (prefere) kun:
__ matenmanĝojn en hotela restoracio;
__ tagmanĝojn en hotela restoracio;
__ vespermanĝojn en hotela restoracio.

Antaŭpagon de 30 € mi sendas, kiel konfirmon de mia aliĝo, al la konto:

**DE82 4146 0116 6242 5485 41, BIC GENODEM1SOE**, Volksbank Werl, Bibliaj Tagoj/ Stefan Lepping.

Dato: Subskribo:

# EXPO 2015 EN LA ITALA URBO MILANO

Milano gastigis la mondan ekspozicion EXPO, kiun dum ses monatoj (de la 1-a de Majo ĝis la 31-a de Oktobro) vizitis pli ol 20 milionoj da personoj. Kadra temo de la ekspozicio estis “Nutrado de la planedo, energio por la vivo”. Unu el la ŝtatoj, kiuj ĉeestis, estis la Sankta Seĝo. Ĝian ekspoziciejon dum la menciita periodo vizitis pli ol 1,8 milionoj da vizitantoj, kiuj havis eblecon ekkoni la strebojn de la Sankta Seĝo koncerne la temon. Gravas la mencio, ke inter la ekspoziciejoj, kiuj plej bone traktis la temon, troviĝis ĝuste tiu de la Sankta Seĝo, kiu pro tio estis premiita.



*Pavilono de la Sankta Seĝo*

La vizitantoj ankaŭ donacis monon por la bonfara agado de la Papo, kiu, pere de Konsilio “Cor Unum”, ilin direktis al rifuĝintaj infanoj kaj familioj en Jordanio. Tiucele oni kolektis ĉ. 150.000 eŭrojn. Krome, oni ankaŭ povis aĉeti la enciklikon “Laudato si’” en diversaj lingvoj. Dum la unuaj monatoj en la ekspoziciejo de la Sankta Seĝo videblis “La lasta vespermanĝo” de Tintoretto, kaj ĝis la fino “Fondo de la Eŭkaristio” de Rubens. Dum la ekspozicio, la ekspoziciejo de la Sankta Seĝo organizis 12 kunvenojn, kiujn partoprenis la reprezentantoj de la Eklezio kaj de diversaj institucioj.

La ekspozicion partoprenis ankaŭ *Caritas*, kun pli ol 250.000 vizitantoj. *Caritas* organizis 11 konferencojn, dum kiuj fakuloj diskutis pri la rajto je nutrado, sed same pri la militoj tra la mondo kaj devigaj migradoj.

Aktualaĵojn koncerne la temon de la ekspozicio oni traktis en la monata informilo “NOI-EXPO”, kiun komune pretigis la redakcioj de la italaj katolikaj ĵurnaloj *Avvenire* kaj *Famiglia Cristiana.* En EXPO 2015 partoprenis ankaŭ la salezana familio, kiu en la “Domo de Don Bosco” prezentis la misiistajn agadojn en la mondaj partoj, kie regas malsato.

Okaze de la datreveno de la Spirito de Asizo, la 27-an de Oktobro la reprezentantoj de diversaj religioj el Milano ĉeestis la “marŝon” en EXPO.

Kvankam la temo de la ekspozicio estis ligita al la problemo de nutrado, kelkaj landoj en siaj ekspoziciejoj “tuŝis” ankaŭ religion. En la ekspoziciejo de Ĉeĥio estis prezentita la “Infano Jesuo de Prago”. Okaze de la nacia tago de Ĉeĥio estis prezentita ankaŭ la muzikaĵo inspirita el la “Infano”. Kuvejto, en sia ekspoziciejo, prezentante diversajn fazojn de la evoluo de la moderna ŝtato, konigis la gravan rolon de fratulino Pascale koncerne la edukadon de infanoj.




*Teksto kaj fotoj de Marija Belošević*

# 69-a KONGRESO de IKUE

## 16-a ĝis 23-a de Julio 2016, NITRA, Slovakio

### Ĉefa temo: “VIZAĜO DE MIZERIKORDO”

En la samtitola Buleo, per kiu estis anoncita la “Eksterordinara Jubileo de la Mizerikor-do”, Papo Francisko mesaĝas: “Jesuo Kristo estas la vizaĝo de la mizerikordo de la Patro. La mistero de la kristana kredo ŝajne trovas sian sintezon en tiu ĉi vorto. Ĝi fariĝis vivanta, videbla, kaj atingis sian plenumiĝon en Jesuo de Nazareto” (Buleo, n-ro 1).

Unusemajna kunestado estos nia komuna irado survoje al la malfermo de la mizerikor-do. Unu-aloke, dum la kongreso ni donos atentigon al la preĝo, ĉar kiel la Papo atentigas “la preĝo estas la nutraĵo de la mizerikordo”. Same, la kongreso estos ebleco pripensi kaj pridiskuti la temon de diversaj vidpunktoj, al kio helpos al ni fakuloj. La pilgrimado estas signo speciala en la Sankta Jaro, ĉar ĝi estas la bildo de la vojo, kiun ĉiu homo faras en sia ekzistado. La vivo estas pilgrimado kaj la homo estas ‘viator’, pilgrimanto, kiu iras laŭ sia vojo ĝis atingi la deziratan celon. Ankaŭ por atingi la Sank-tan Pordon en Romo kaj en ĉiu ajn loko, ĉiu homo devos fari, laŭ siaj propraj fortoj, pilgrimadon. Tio ĉi estos signo de la fakto, ke ankaŭ la mizerikordo estas atingota celo, kiu postulas respondecon kaj penadon. La pilgrimado do estu stimulo al la konvertiĝo: trairante la Sanktan Pordon ni lasu nin esti brakumitaj de la mizerikordo de Dio kaj ni respondecos esti mizerikordaj al la aliuloj tiel, kiel la Patro estas al ni. (Buleo, n-ro 14).

Respondante al tiu alvoko, dum la kongreso ni havos kelkajn pilgrimojn. Ni trairos la pordojn de tri katedraloj de Nitra, Bratislava kaj Trnava. Same ni pilgrimos al Marianka, la plej malnova Maria pilgrimejo en Slovakio kaj al la Kalvaria monto de Nitra.

La espero estas, ke nia ariĝo povu doni al ni pli kaj pli grandan konscion, ke ankaŭ ni – kiel laikoj, kiel kredantoj kaj kiel Esperantistoj – havas nemalhaveblan rolon en la misio de la Eklezio, kaj ke el spirite riĉa kunestado povu naskiĝi nova elano, kiu realigu iniciatojn kaj programojn, kiuj helpu nin ĉiujn daŭrigi nian ateston.

**LA PROGRAMO** estos preparita laŭ la skemo de la ĝisnunaj kongresoj. Ĉiutage okazos Matenaj laŭdoj, Sankta Meso, Rozario, Vesperaj preĝoj, Kompletorio. Indikon pri tio oni trovos en la fina pro-gramo.

La unua tago estos sabato kaj la unua servo, la vespermanĝo. Dum la unua tago (sabaton 16.07.) okazos ankaŭ la meso. La lastan tagon (sabaton 23.07.) la lasta servo estos la tagmanĝo (tiuj, kiuj pli frue foriras, ricevos la manĝosakon). Dum la semajno oni traktos la temon per prelegoj kaj en pli malgrandaj diskutgrupoj. Kiel jam menciite, dum la kongreso ni organizos du pilgrimojn. La tuttagan al Bratislava kaj Marianka, la duontagan al la “Slovakia Romo” Trnava kaj kelkhoran al la Kalvaria monto de Nitra.

**LA KONGRESEJO** estos la Porpastra seminario de S-ta Gorazd en Nitra. La seminario situas sub la kastelo, kie troviĝas la katedralo, la dioceza muzeo, la episkopa palaco, monu-mento de s-ta Johano Paŭlo la 2-a. La loko troviĝas je la pieddistanco de la centra fervoja stacidomo / centra busstacidomo (ĉ. 20’) kaj same atingebla per urba buso aŭ taksio.

## RADIO VATIKANA - ELSENDOJ EN ESPERANTO

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21:20 MET (19:20 UTC). **DIMANĈE** kun daŭro 8-minuta kaj **MERKREDE KAJ ĴAŬDE** kun daŭro 9-minuta.

**Por aŭskulti ilin per la Interreto:**

**Rekte je la indikita horo:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp

**Laŭpete:** http://www.radiovaticana.va/esp/on_demand.asp

**Arkivo:** http://www.radio-vatikana-esperanto.org

**Skribu al: RADIO VATIKANA - ESPERANTO, SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**

**Ret-poŝto:** <esperanto@vatiradio.va>

Por ricevi retpoŝte la informilon de RV, petu abonon al: <promo@vatiradio.va>

Je dispono estos 1-, 2-, 3-, 4- kaj 5-litaj ĉambroj. Ĉiuj ĉambroj havas antaŭĉambron kaj apartan necesejon kaj duŝilon. La litaĵojn kaj mantukojn oni ricevas. La ĉambroj ne havas klimatizilon. La kapacito de 1-, 2-, 4- kaj aparte 5-litaj ĉambroj estas EGE limigita.

En la konstruaĵo estas la kapelo, granda kaj kelkaj malpligrandaj salonoj. La senpaga retaliro estas en ĉiuj salonoj kaj dormoĉambroj.

La manĝejo troviĝas en alia, vidalvida konstruaĵo, atingebla trans la placeto. Ĉiuj manĝoj kiel kutime, okazos je la antaŭfiksita horo kaj komenciĝos kun komuna preĝo. Eblas vege-tara manĝaĵo kaj diversaj dietoj (kun anticipa averto per aliĝilo).

Je dispono por la kongresanoj estos senpaga parkejo por deko da veturiloj.

Proksime al la seminario troviĝas kelkaj hoteloj. Ni ne peros ilin, sed ni povas doni konsilojn.

**LA URBON** Nitra oni ne devas aparte prezenti. Ĝis nun ĝi gastigis plurajn E-aranĝojn, kaj venontjare en la semajno post nia kongreso tie okazos la Universala Kongreso.

Tamen ni menciu, ke la urbo plej facile atingeblas buse de Bratislava kaj de aliaj enlandaj lokoj. Al Bratislava, kiu estas je distanco de ĉ. 1 horo venas la internaciaj busoj de pluraj eŭropaj urboj. La plej ofta ligo estas inter Bratislava kaj Vieno. Pluraj busoj survoje traveturas la flughavenojn de Vieno kaj Bratislava. Ankaŭ Nitra estas ligita trajne.

La diversaj horarojn (ĉu busajn, ĉu trajnajn) oni povas konsulti http://cp.atlas.sk/vlakbus/spojenie

Cetere, pli pri la gastigantaj urbo kaj lando bv. trovi ĉe http://www.nitra2016.sk

**ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ,** bv. atente legi:

⇨La aliĝo validas post la ricevo kaj de la aliĝilo kaj de la aliĝkotizo. Ĉiuj aliĝintoj ricevos la konfirmon pri la aliĝilo kaj informojn kiel atingi la kongresejon.

⇨La mendo de la loĝado (kompleta) estos traktata nur post la alveno de la NEPRA antaŭpago de 20%.

⇨Prioritaton en la mendo de du-litaj ĉambroj havos geedzoj.

⇨Post ricevo de la mendo, la organizantoj tuj komunikos, se la elektita loĝadkategorio jam estas elĉerpita.

⇨En kazo de ne alveno, NUR la antaŭpago por la loĝservoj estas transdonebla al alia persono, kondiĉe, ke tiu regule aliĝis kaj pagis la aliĝkotizon.

⇨Reston de la sumo oni povas pagi al la banka konto, aŭ surloke nur per kontanta mono, en eŭroj

. ⇨La antaŭpago por la loĝservo pro nealveno estos redonita, nur se oni sukcesos anstataŭigi la menditan lokon.

⇨De la redonita sumo pro organizaj kialoj oni forprenas 10 EUR.

⇨La aparte menciitaj kostoj de la tag- kaj vesper-manĝoj rilatas al tiuj kongresanoj, kiuj loĝos aliloke kaj deziras ĉeesti la komuna(j)n manĝo(j)n. Tiuj, kiuj jam ĉe la aliĝo estas certaj pri la partoprentagoj kaj deziras mendi manĝojn, tiuj devas indiki precize la menditajn manĝojn. Surloke (ĝis la antaŭa tago) eblos mendi manĝojn. Tamen pro organizaj kialoj, oni petas, ke oni konigu al la organizantoj sian preferon maksimume ene de la 1-a de Julio.

⇨Se vi interesiĝas pri la hotelaj loĝeblecoj en la proksimeco de la kongresejo, bv. tion kiel eble plej rapide komuniki al la organizantoj.

⇨La prezoj estas kalkulitaj laŭ la kostoj en Oktobro 2015.

⇨Se vi volas kontribui al la tema parto de la programo, bv. klare skribi, al kiu subtemo rilatas via kontribuo. Krome, bv. sendi ĝis dek frazan resumon de la kontribuo antaŭ la 1a de Majo.

⇨Se via kontribuo estos listigita en la programo, ĝi povus daŭri ĝis 25' kaj vi estos petata liveri skriban version de la prelego por posta aperigo.

⇨**Dum UK-restado:**

En la seminario eblos loĝi dum la plia, UK-semajno. Tamen, oni devas tion mencii en la aliĝilo kaj mendi kaj pagi nur pere de IKUE. La restado en la seminario dum la UK estos rezervita nur por la aliĝintoj al la UK. La menciita prezo inkluzivas la tranoktadon kaj matenmanĝon. Momente oni nur enketas, ĉu kaj kiom da personoj interesiĝas pri la tag- kaj vesper-manĝoj. Same necesas la antaŭpago de 20%. La mendojn por la dum-UK-restado oni akceptas plej malfrue ĝis la 1-a de Majo.

Oni nepre devas mencii la UK-kongresnumeron!

La UK-kongresejo troviĝas je ĉ. 15´ pieddistance de la seminario.

**PAGMANIEROJ**

**BANKO:** pere de la itala poŝt-banka konto:

**IBAN: IT34 H076 0103 2000 0002 3290 000   BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX**

je nomo: UNIONE INTERNAZIONALE CATTOLICA ESPERANTISTA

adreso: Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 ROMA-RM (Italia)

***Atentu:*** 1) eŭropanoj de la landoj kies bankoj aliĝas al sistemo "SEPA" ne pagas komisiojn por alsendi la monon. Oni petu informojn ĉe sia banko;

2) oni skribu precize la nomon: "Unione internazionale cattolica esperantista". Oni ne uzu mallongigojn, nek la siglon IKUE, nek alian akronimon: oni riskas, ke la pago ne estu farita.

**UEA: konto "ikue-v" de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - Romo, Italio**

***Ĉeĥoj kaj Slovakoj povas pagi per la bankokonto en FIO-banko:***

***je la nomo de: Pavol Petrík, Na Dujave 3, 08256 Pečovská Nová Ves kun mencio:*** **IKUE-kongreso IBAN: SK8383300000002600870172   BIC: FIOZSKBAXXX**

Oni ne FORGESU skribi la kialon de la pago.

**Oficialajn kaj aktualajn informojn pri la kongreso sekvu pere de:**
**http://www.ikue.org/kong2016/index.htm**
**https://www.facebook.com/IKUE-Kongreso-271488306314727**
**twiter.com/IKUEkongreso**
**Esperanto-elsendo de la Vatikana radio: www.radiovaticana.org**
**Oni adresu proponojn kaj demandojn al:**
**ikuekongreso@gmail.com aŭ ikue.reto@gmail.com**

# KURIOZA KRISTNASKA ENKETO EL BRITIO




## KION FARAS PAĈJO KRISTNASKO DUM LA JARO?

**La respondoj de la britaj infanoj**

Kara Paĉjo Kristnasko, kiel vi pasigas viajn tagojn dum la jaro? Kion vi faras, en la 364 tagoj, kiam vi ne laboras? La koncernato preferis ne reagi, sed la malgrandaj britoj respondis anstataŭ li. El amuza opinisondo farita en Britio ĉe infanoj aĝaj inter 5 ĝis 8 jaroj reliefiĝis, ke ili imagas Paĉjon Kristnaskon tiel ĉi, dividita inter manĝado de fiŝoj kaj fritItaj terpomoj sur sofo kaj la dimanĉa tagmanĝo kun la feino de la dentoj  26% opinias, ke li trinkas bieron ĉiuhore (klariĝus, do, kial li havas ventregon) dum 16% el la junaj intervjuitoj certas, ke li aktive partoprenas ankaŭ en aliaj festoj, vestante sin, ekzemple, kiel kukurbo okaze de Halojn, aŭ skribante leterojn por sia edzino sojle de la tago de sankta Valenteno. Ne mankas pli fantaziaj bildoj: sportumanta Paĉjo Kristnasko (laŭ iuj li eĉ praktikus *bungee jumping,* saltadon kun elasta ŝnuro), ekologiisto kaj pacisto ("dum la libera tempo li klopodas savi la mondon, skribante la liston de la bonuloj kaj malbonuloj sur reciklita papero") kaj eĉ leterportisto (li dezirus liveri leterojn, kaj male…). Koncerne hobiojn: li kantas (42%), kolorigas (27%), kuiras biskvitojn (25%), butikumas (20%), kuras sur rultabulo (12%). La respondoj de la infanoj fariĝis bildoj, kaj la bildoj, kalendaro 2016, vendata en Interreto (vidu alte la fotografion de la tagmanĝo kun la feino de la dentoj).

## KOTIZTABELOJ

**Tarifo A:** iamaj socialismaj landoj de Eŭropo (escepte de Slovenio); ĉiuj landoj de Azio (escepte de Arabio, Israelo, Japanio, Malajzio, Sudkoreia Respubliko), Afriko (escepte de Sudafriko), Latina Ameriko, Oceanio (escepte de Aŭstralio, transmaraj teritorioj de Francio).

**Tarifo B:** Ĉiuj mondaj landoj ne inkluzivitaj sub A.

| KONGRESA ALIĜKOTIZO (ne repagebla kaj nek transdonebla!) | | |
|---|---|---|
| Aliĝperiodo | **A** | **B** |
| **ĝis la 29-a de februaro** | 20 EUR | 35 EUR |
| **de la 1-a de marto ĝis la 31–a de majo** | 35 EUR | 50 EUR |
| **de la 1-a de junio** | 45 EUR | 70 EUR |
| **parta partopreno taga** | 8 EUR | 10 EUR |
| pilgrimtago al Marianka kaj Bratislava (ĉe parta partopreno) | 25 EUR | 25 EUR |
| duonpilgrimtago al Trnava (ĉe parta partopreno) | 15 EUR | 15 EUR |
| **Apogkotizo:** 50% de la plena kotizo<br>(oni ne partoprenas en la kongreso, sed ricevas la kongresan dosieron) | | |
| Infanoj ĝis 8 jaroj aliĝas senpage | | |
| Ne-IKUE-anoj krompagas la aliĝkotizon 10 EUR pli por plena partopreno | | |

| priskribo de la ĉambro | A | B |
|---|---|---|
| 1-lita | 295 EUR | 325 EUR |
| 2-lita | 220 EUR | 260 EUR |
| 3-lita | 210 EUR | 240 EUR |
| 4-lita | 195 EUR | 225 EUR |
| 5-lita | 185 EUR | 215 EUR |

**Prezo inkluzivas:** 7 tranoktojn, 6 vespermanĝojn, 7 matenmanĝojn kaj 7 tagmanĝojn; bustransporton dum pilgrimadoj kaj necesajn enirbiletojn. La supraj kostoj ne inkluzivas asekuron!

Partaj partoprenantoj: manĝoj en la kongresejo: tagmanĝo: 6,5 EUR vespermanĝo: 4 EUR.

**Dum UK-restado:**

| ĉambro | 1-lita | 2-lita | 3-lita | 4-lita | 5-lita |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 persono / 1 tranokto kun matenmanĝo | 30 EUR | 26 EUR | 22 EUR | 19 EUR | 17 EUR |

**69a KONGRESO de IKUE**
**NITRA, Slovakio, 16.-23.07.2016**

**ALIĜILO KAJ MENDILO**

**Sendu rete al:** ikuekongreso@gmail.com **aŭ per ordinara poŝto al la adreso:**
Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio

Ĉiu aliĝinto uzu apartan aliĝilon. La aliĝilon / mendilon bv. plenigi preslitere.

| | |
|---|---|
| PERSONA(J) NOMO(J) | FAMILIA NOMO |
| ADRESO (strato, domnumero) | |
| NASKIĜDATO | TELEFONO |
| RETADRESO | RETADRESO |
| Mi estas vegetarano: JES NE | Mi estas handikapito: JES NE |
| Mi planas alveni (dato, transportilo): | Mi planas forveturi (dato, transportilo): |
| Mi mendas servojn dum la Kongreso de IKUE (metu ☒)<br>1-lita ĉambro ☐<br>2-lita ĉambro ☐<br>4-lita ĉambro ☐<br>5-lita ĉambro ☐ | Mi estas parta partoprenanto kaj mi mendas manĝojn:<br>tagmanĝoj (datoj):<br>vespermanĝoj (datoj):<br>pilgrimoj:<br>Mi deziras dum la UK loĝi en la seminario: Mia KN: ________<br>Dum la tuta semajno ☐ nur parte (datoj):<br>En ĉambro □: 1-lita ☐ 2-lita ☐ 3-lita ☐ 4-lita ☐ 5-lita ☐<br>Mi interesiĝas pri tag- kaj vesper-manĝoj dum la UK: ☐ |
| Mi deziras dividi ĉambron kun | |
| Mi havas apartan dieton | |
| Al la programo mi pretas kontribui per | |

**Mi pagas:** Kongreskotizon = ________ EUR
Loĝservojn/antaŭpagon por la Kongreso = ________ EUR
UK-loĝservojn/antaŭpagon = ________ EUR
Libervola kontribuo al la kongresa kaso = ________ EUR

**Antaŭpagon de ________ EUR mi ĝiris al la:**

☐ Banka konto de IKUE
☐ IKUE-konto ĉe UEA
☐ Banka konto en FIO-banko

Dato: ____________________________ Subskribo: ____________________________

## PATRIOTISMO NE SUFIĈAS



Ni prezentas la historion de brita flegistino, anglikanino, kiu, pro sia kredo, agadis dum la unua mondmilito por savi la vivon de soldatoj, sen distingo de nacieco; dank' al ŝia helpo preskaŭ 200 soldatoj de la Triopa Entento fuĝis el la Belgio okupaciita de Germanio kaj pro tio ŝi estis mortkondamnita kaj ekzekutita, antaŭ 100 jaroj, malgraŭ internaciaj alvokoj, fare de la germana Imperio. Ŝia nomo estis Edith Louisa Cavell.

Naskita la 4-an de Decembro 1865 en Swardeston, vilaĝo apud Norwich (Britio), Edith Cavell estis la unua el la 4 gefiloj de la anglikana pastoro Frederick kaj de Louisa Sophia Cavell: ĝi estis familio, kiu ĉiam kundividis siajn havaĵojn kun la malpli favoratoj, malgraŭ la malgrandaj enspezoj. Post laboro kiel dommastrino, ankaŭ ĉe familio de Bruselo (1890/1895), Edith studis kiel flegistino en Londono kaj laboris en pluraj hospitaloj de Britio, ĝis kiam (1907) ŝi estis dungita kiel ĉefflegistino de ĵus starigita internulejo por flegistinoj en Ixelles, Bruselo. En 1910 ŝi komprenis, ke la profesio de flegistino suficê plifirmiĝis en Belgio por ke ĝi havu propran ĵurnalon kaj sekve ŝi lanĉis tian ĵurnalon, *"L'infirmière"*. Unu jaron poste ŝi instruis la profesion en 3 hospitaloj, 24 lernejoj kaj 13 infanĝardenoj en Belgio.

Je la eksplodo de la unua mondmilito ŝi estis en Norfolk ĉe sia patrino, kiu fariĝis vidvino. Ŝi revenis al Bruselo, kie ŝia kliniko kaj lernejo por flegistinoj estis nun regata de la Ruĝa Kruco.

Novembre de 1914, post la okupacio de Belgio fare de la germanoj, Edith Cavell, kun aliaj, inter kiuj estis princo Reginald de Croy, kiu disponigis sian kastelon, komencis helpi britajn soldatojn kaj prizorgis ilian fuĝon el la okupaciita Belgio al la neŭtrala Nederlando. Britaj kaj francaj vunditaj soldatoj kune kun belgaj kaj francaj civiluloj en aĝo de soldatservo estis kaŝitaj en ŝia kaj aliaj domoj; ili ricevis falsajn legitimilojn kaj iom da mono kaj poste oni ilin kondukis al la nederlanda landlimo. Tio ĉi metis Cavell'n kontraŭ la germana milita leĝo. Perfidita de belga kunlaboranto de la okupacianta armeo, oni arestis ŝin la 3-an de Aŭgusto 1915 kaj ŝi estis kulpigita pri gastigado de malamikaj armeanoj. Ŝi konfesis, ke ŝi helpis fuĝi almenaŭ 60 britajn kaj 15 francajn soldatojn kaj almenaŭ 100 francajn kaj belgajn civitanojn en aĝo de soldatservo, kaj ke multaj el ili gastis en ŝia loĝejo. Dum la juĝprocezo Cavell deklaris, ke la helpitaj homoj, post atingo de sekura loko, skribis dankleterojn al ŝi. Favore al ŝi intervenis pluraj diplomatiuloj, sensukcese: kun aliaj 5, ŝi estis kondamnita je morto.

En la nokto antaŭ la tago de la ekzekuto (la 12-an de Oktobro 1915) ŝi diris al honorinda Stirling Gahan, la anglikana kapelano rajtigita viziti ŝin: «Patriotismo ne sufiĉas. Mi devas havi nenian malamon aŭ ĉagrenon rilate al iu ajn». Ĉi tiuj vortoj estas gravuritaj sub ŝia statuo en St Martin's Place, apud Trafalgar Square en Londono. Post la milito ŝia korpo estis reportita al Britio kaj entombigita, laŭ speciala permeso de la Reĝo, en la Katedralo de Norwich, post solena ŝtata funebra rito en la Katedralo de Westminster.

**Gracoplenan Kristnaskon kaj Di-benitan novan jaron 2016 al ĉiuj legantoj de Espero Katolika el la tuta koro deziras la Estraro de IKUE kaj la redakcio de Espero Katolika.**

MOVADAJ INFORMOJ

## SACERDOTIĜO DE D-RO MAX JAROSLAV KAŠPARŮ



La 31-an de Oktobro 2015 okazis en urbeto Žirovnice en Ĉeĥio neordinara solenaĵo. En la tiea romkatolika preĝejo de sanktaj Filipo kaj Jakobo oni festis la pastriĝon en la grekkatolika Eklezio de nia estimata frato, la konata kuracisto-psikiatro kaj verkisto, prof. Doc. ThDr. MUDr. Mgr. Maksmiliano Jaroslav Kašparů, ĝisnuna diakono. En lia naskiĝurbeto renkontiĝis kredantoj de ambaŭ katolikaj ritoj kunigitaj sub la patreco de la Papo kaj je la ĉeesto de liaj familianoj, geamikoj, inter ili ankaŭ esperantistoj. La ordinito estis ja prezidanto de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio kaj multaj televidaj spektantoj lin konas pro liaj interesaj prelegoj kaj diskutoj ne nur pri fakaj psikiatriaj kaj spiritaj temoj, sed ankaŭ pro lia publika propagando de la esperantistaj idealoj.

Nian karan fraton Makson ordinis la grekkatolika episkopo de Prago, mons-ro Ladislav Hučko, en kunfrateco kun aliaj grekkatolikaj kaj romkatolikaj religiuloj. La neordinara festo estis vere impresodona. Poste okazis la renkonto de la partoprenantoj en la paroĥa domo kun malgranda refreŝiĝo kaj la ebleco interbabili.

Sacerdoto Max Kašparů ekas nun novan etapon de sia vivo. Li rolos kiel spirita kaj same faka gvidanto de la kapelanoj en la malsanulejoj, do li povos bone utiligi siajn riĉajn tutvivajn diversdirektajn spertojn, profite al tiuj, kiuj tion ege bezonas. Ni estu certaj, ke en lia larĝa koro ankaŭ ni havos nian firman lokon. Do ni deziras al la novpastro multajn gracojn de la Dia Providenco kaj la ŝirmon de la Virgulino Maria dum ĉiuj pluaj vojoj.

*Ĉeĥa IKUE-Sekcio*

## FONDO DE LA VIRINA E-ASOCIO EN RUTSHURU

En nia orienta provinco Norda Kivuo en regiono Rutshuru en Demokrata Respubliko Kongo (Afriko) estas teritorio, kie la malsekureco turmentas tutan regionon. Ekzistas najbare diversaj ribeluloj kaj negativaj grupoj. Pro tiu ĉi malfavora situacio en nia regiono multaj virinoj kaj fraŭlinoj estas ĉie seksperfortataj. Estas tio sufero por inoj, multaj estas infektitaj per aidoso-viruso.

Ni devas lukti kontraŭ tiu ĉi fifarado kaŭzata de tiuj negativaj grupoj. Ni scias, ke la virino estas la familia ponto en la mondo. Se la virinoj ne ekzistus, ĉu tiu ĉi mondo sen la virina sekso plu povus ekzisti? Ni pensas, ke la virino kapablas fari samajn laborojn kiel la viro. Sed estas iuj, kiuj neglektas ĉiam virinsekson dirante, ke ili ne plu kapablas ion fari.

Principe la virino estas homo egalvalora al la viro, kapabla plenumi ĉiujn funkciojn en la homa socio, ŝi estas riĉeco por la socio kaj ŝi akompananta viron en plenumado de diversaj taskoj. Ĉi tiu ideo devas esti akceptita de ĉiuj, eĉ de tiuj, kiuj neglektas la virinsekson.

Senprokraste kelkaj niaj celadoj:

- lukto kontraŭ aidoso kaj seksaj malsanoj,
- lerni Esperanton,
- strebi pri la paco kaj kunvivado,
- sperti en fako de kudrado,
- strebi pri edukado kaj planado, zorgi pri georfoj kaj laborigi la senlaborajn filinojn.

Ni esperas, ke nia eta virina asocio bone evoluos, kiam la milito en DRK ĉesos. Nia deziro estas kunlabori kun mondaj virinaj asocioj (ĝemeliĝe), subtenante forte nin en diversaj realigeblaj projektoj.

Ni sendos al vi etan projekton pri kreado de kudrejo en nia loko. Tio ĉi povos helpi nin en la forigo de malriĉeco.

Amike vin salutas prezidantino de la Virina E-Asocio *Anita DUSABE*.

Virina E-Asocio
Po Box 08 Bunagana
Kisoro/Ugando, Afriko